ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 7-8

Julio - Aŭgusto 2015 Kol.363-364 / 31

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Membroj de UEA, J.Jacobsen, Premiitaj eseoj, UEA-komunikoj, IFEF-kongreso, UK en Lillo, Kristaloj en artikoj, El la fervoja mondo, Polaj E-eventoj, Vizito de francoj, Lanĉov-memoruloj, Tri bonhumoraj artikoloj

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

UEA havas jam pli da membroj ol en 2014

Kun kresko de 124 membroj UEA haltigis pasintjare la falon en sia statistiko kaj registris entute 5027 individuajn membrojn. Ĉi-jare la nombro kreskas ankoraŭ pli forte kaj jam komence de junio superis la definitivan pasintjaran nombron. La 7-an de junio estis registritaj jam 5050 membroj. Tio estas per 545 pli multe ol en la sama tago pasintjare.

La ĉi-jara kresko sekvas ĉefe el la populareco de la 100-a UK en Lillo, al kiu ĝis la komenco de junio jam aliĝis preskaŭ same multe da kongresanoj kiel al la tri antaŭaj UK-oj sume. Tiun t.n. kongresan efikon kaŭzas tio, ke la kongreskotizoj estas malpli altaj por tiuj, kiuj aliĝas al UEA minimume kiel Membro kun Jarlibro. Entute 775 kongresanoj de la Lilla UK ne membris en UEA pasintjare, sed kotizis ĉi-jare. Tamen, UEA povis bonvenigi inter siaj membroj ankaŭ 380 esperantistojn, kiuj ne aliĝis al la UK.

Kiu ankoraŭ ne (re)membriĝis en UEA por 2015, povas daŭre fari tion.
Plej facile tio eblas per la reta aliĝilo
ĉe:http://www.uea.org/alighoj/alighilo.

Jesper Jacobsen gvidos la IKU en Lillo

D-ro Jesper Lykke Bannier-Jacobsen estis nomumita de la Estraro de UEA kiel la rektoro de la 68-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato, kiu okazos kadre de la 100-a Universala Kongreso de Esperanto en la franca urbo Lillo.

D-ro Jacobsen, dandevena fizikisto, estas profesoro ĉe la Universitato Pierre kaj Marie Curie en Parizo. Krom kiel rektoro de IKU li kunlaboras por la 100-a UK kiel membro de la Loka Kongresa Komitato pri tradukado. Li estis ankaŭ kunlaboranto pri fiziko de Plena Ilustrita Vortaro.

La ĉi-jara IKU proponos dek prelegojn anstataŭ naŭ kiel kutime. La prelegoj estis jam pli frue elektitaj de la Estraro de UEA laŭ la propono de la Komisiono pri IKU. Iliaj resumoj estas legeblaj ĉe http://www.uea.org/teko/IKU/2015.

UEA eldonis duan kolekton de premiitaj eseoj

Post "Pri homoj kaj verkoj", aperinta en la jaro 2012, UEA eldonis novan kolekton de verkoj premiitaj en la branĉo Luigi Minnaja. La eseoj de la unua volumo temis pri la Esperanto-kulturo, dum la nova kolekto, "Interlingvo inter lingvoj", prezentas tekstojn pri lingvo kaj lingvaj demandoj, aperintajn en la periodo de la jaroj 1979 ĝis 2012. Tiu temkampo estis ĉiam populara inter la konkursantoj, kio rezultis libron duoble dika (271 paĝoj) kompare kun la unua volumo. Ankaŭ la nova kolekto estis redaktita de Humphrey Tonkin kaj Michaela Lipari, respektive la prezidanto kaj sekretario de la Belartaj konkursoj.

Inter la enkonduko de Tonkin kaj postparolo de Carlo Minnaja aperas dek ses eseoj. Tri aŭtoroj reprezentiĝas per pli ol unu verko. Christian Rivière kontribuis eĉ per kvar: "Vortfarado kaj radikfarado", "Tamen kompreni: Rolo de la kunteksta redundanco", "Mezuro de informokvanto", kaj "La pluralo". Sten Johansson estas la aŭtoro de "Ĉu fundamenta evoluo aŭ neologisma glosolalio?" kaj "Uzi interreton kiel tekstaron por lingvaj esploroj". Ankaŭ el la plumo de Bernard Golden devenas du eseoj: "La svahila

lingvo kaj Esperanto – komparo kaj kontrasto" kaj "Piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj planlingvoj".

La aliaj verkoj en "Interlingvo inter lingvoj" estas "Komo" (Marie Bartovská), "La lingvaĵo de porinfana literaturo" (Zsuzsanna Csiszár), "Lingvo kaj dialekto" (Geraldo Mattos), "Leksikaj novismoj kaj neologismoj: Anatemi au odi?" (Aleksandro Melnikov), "Niaj verboj sen veproj" (Gonçalo Neves), "Digrafio: Speciala kazo de rilato inter lingvo kaj skribo" (Nikola Rašić), "Konfuzigaj faktoroj en lingva komunikado" (Jan Werner) kaj "Kiom da ĉina en Esperanto?" (Xu Daorong).

Fine de sia analiza antaŭparolo Tonkin resumas la mesaĝon de la esearo: "Esperanto estas ne nur lingva fenomeno, sed ankaŭ fenomena lingvo. Ni studu ĝin, ni analizu ĝin kaj ni utiligu ĝin konscie kaj konsekvence. Alproprigante eldiron de alia eseisto fama, Samuel Johnson, ni diru, ke tiu kiu laciĝas pri Esperanto, laciĝas pri la mondo."

"Interlingvo inter lingvoj" estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA por 15,00 euroj. Ĉe samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj oni ricevas trionan rabaton. Aldoniĝas la sendokostoj (10%; minimume 5 EUR) kaj ene de EU imposto de 6%. La prezo de la antaŭa volumo, "Pri homoj kaj verkoj", estas 9,00 euroj. El ret-radio

El gazetaraj Komunikoj de UEA

En februaro 2015, la estraro de UEA anoncis konkurson por la posteno de Ĝenerala direktoro, celante trovi posteulon por Osmo Buller post lia emeritiĝo en la unuaj monatoj de 2016.
La limdato por kandidatiĝoj estis la 31-a de majo.

Ĝis la limdato venis ses kandidatiĝoj. Post pluretapa diskutado, la estraro decidis inviti tri el la kandidatoj al persona intervjuo en Lillo, la 24-an de julio, unu tagon antaŭ la komenco de la 100-a Universala Kongreso. La tri kandidatoj invititaj al intervjuo estas Konrad Andrzejuk el Pollando, Veronika Poór el Hungario kaj Nikola Rašić el Nederlando.

"Ni estas kontentaj fronti elekton inter pluraj interesaj kaj kapablaj kandidatoj", komentis d-ro Mark Fettes, prezidanto de UEA. "La intervjuoj donos okazon por pli fundaj diskutoj pri la direktoj, prioritatoj kaj kondiĉoj de la laboro. Ni serĉas homon, kiu povas gardi la plej gravajn tradiciojn kaj trajtojn de UEA, sed ankaŭ kungvidi procezon de renovigo kaj modernigo."

La 67-a Internacia fervojista Esperanto-kongreso 16 - 23 majo 2015

La ĉi-jara IFEF-kongreso okazis samtempe kun la 11-a ĉina E-kongreso, kiu daŭris nur tri tagojn. Ĝi okazis en la urbo Kunming, nomata la urbo de eterna printempo. La temperaturo superis 30˚C dum nia kongresa semajno. Kunming situas en bela parto de la provinco Yunnan en sudokcidenta Ĉinio. Ni restadis rande de la urbo en agrabla hotel- kaj kultur-komplekso Fubao, kie okazis ambaŭ kongresoj.
Krom multaj ĉinaj partoprenantoj al la evento aliĝis 42 geesperantistoj el Eŭropo. Jam en la flughaveno bonvenigis nin “freŝbakitaj esperantistoj”. Ili estis volontuloj, studentoj de la Profesia Artkolegio de Kunming. En ĉiuj okazaĵoj ili estis pretaj saluti nin denove. Dum la interkona vespero ĉinaj esperantistoj preparis muzikan programon.

La dimanĉa inaŭguro estis impona. Ĉe la enirejo de la salono ambaŭflanke vice staris belaj junulinoj vestitaj en buntaj kaj elegantaj etnaj kostumoj. Sur la podio sidis ĉinaj reprezentantoj kaj gravuloj de la E-movado. Inter ili la prezidantino de IFEF Rodica Todor, la sekretario Vito Tornillo kaj la honora prezidanto Romano Bolognesi, la unua el Rumanio, la du lastaj el Italio. Post la festparoladoj oni realigis komunan fotadon antaŭ la akceptejo. Agrabla estis muzika prezento per tradiciaj ĉinaj in-

strumentoj. Post tio, sekvis bonvenigo de reprezentantoj de diversaj landaj sekcioj de IFEF kaj aliaj asocioj. Ĉe la fino, post la malfermo de la kongresoj, studentoj de la Profesia Artkolegio bravvoĉe kantis la E-himnon “La Espero”.

Posttagmeze jam komenciĝis serioza programo. Ĉinoj prezentis surekrane retpaĝojn de “El Popola Ĉinio” kaj de Ĉina Radio Internacia (ĈRI), ni povis aŭskulti partojn de la programo kaj spekti kelkajn filmetojn, kiuj gajnis la konkurson de la filmfestivalo “Teo kaj Amo”. Posttagmeze okazis E-kurso gvidata de s-ino Luigia Oberrauch Madella el Italio.
La temo de la fervojista kongreso estis: “Esperanto kunligu la landojn laŭ la nova Silka Vojo”. Oni menciis la fakton, ke la unua internacia fervojlinio de Ĉinio ekiris de Kunming ĝis Vjetnamio en la jaro 1910. Okazis kelkaj fakprelegoj, gazetara konferenco, oni parolis pri movadaj aferoj kaj fervojaj novaĵoj. Bruno Henry parolis pri sia vojaĝado en Irano, Liu Jun prelegis pri la svisa fervojo, Ladislav Hakl pri la vartrafiko en Eŭropo kaj Azio. Gastoj el Bulgario prezentis la venontan IFEF-kongreson okazontan apud la urbo Varna ĉe la Nigra maro. Ĉe la fino de la kongreso oni transdonis al ili Esperanto-flagon.

Ege interesaj kaj emociplenaj estis ĉiuvesperaj kulturaj programeroj kaj altnivelaj artaj spektakloj fare de junaj studentoj kaj profesoroj de la Profesia Artkolegio, kies direktoro s-ro Duan Yongxing estas esperantisto kaj

samtempe la prezidanto de la LKK. Ni spektis diversajn dancojn, kantojn kaj ĥorkantadon, muzikaĵojn kaj akrobataĵojn. En tiuj spektakloj oni nur malfacile povas superi la ĉinan talenton. Ĉio estis vere altkvalite prezentita kaj la kantotekstojn tradukitajn al Esperanto ni povis legi surekrane. Ni estis ravitaj pri ĉiuj riĉaj programeroj. Ili restos longtempe en la memoro de ĉiuj partoprenintoj.

Alia rimarkinda afero estis la manĝo. Rondaj tabloj pleniĝis per specialaj ĉinaj pladoj, parte tre spicitaj. En la memserva manĝejo estis elekto el pli ol kvindek pladoj. Abundo da ĉiuspecaj legomoj, viandaĵoj, ovaĵoj, fiŝaĵoj, vaporumitaj farĉitaj farunbuloj, diversaj saŭcoj, supoj, kuketoj, akvomelono kaj kompreneble ne mankis rizo trifoje tage. Ĉiutage ni povis gustumi ion novan. La manĝoj ofte estis tro spicitaj, tro pikaj. Tamen ĉio estis tre bongusta. Ĉinoj kutime trinkas akvon, teon aŭ rizakvon. Dum la bankedo ni gustumis fortan brandon. Se oni deziris trinki kafon, oni devis ĝin aĉeti en vendejo kaj mem pretigi.

Dum la IFEF-semajno ni ekskursis al la monto Xishan (Okcidenta monto). Per telfero ni supreniris ĝin kaj de tie ni piede malsupreniris admirante belajn pejzaĝojn, diversajn pavilonojn, ornamitajn ŝtuparojn, religiajn altarojn, kavojn, rokarojn kaj la lagon Dianchi.

Dum alia duontaga ekskurso ni vizitis fervojmuzeon de Yunnan. Ĝi estis konstruita en la jaro 1990 ĉe la norda fervojstacio. Ni vidis multajn eksponaĵojn de objektoj bezonataj ĉe la fervojo kaj historiajn fotojn, dokumentojn pri konstrufazoj de la fervojo, mapojn, uniformojn, trajnmodelojn ktp. En la lokomotiva halo nin impresis diversaj lokomotivoj, ĉe kiuj ni grupe fotiĝis. La muzeo donas superrigardon pri la disvolviĝo de la fervojo en la provinco Yunnan.

Poste ni ĝuis promenon en la parko de la lago Cuihu (Verda lago). Ĝi estas tre animita. Kelkaj personoj ekzercis dancadon kaj aliaj spontanean kantadon. Iuj ripozis ĉe lotusplena lageto, aŭ ludis ĉinan tabloludon, aliaj aĉetumis aŭ rigardis budojn plenajn de memoraĵoj, vestaĵoj, manĝaĵoj. Admirin-

daj estas diversaj pavilonoj, pontetoj, insuletoj kaj bambuaro. Bedaŭrinde ne estis sufiĉe da tempo por trairi kaj malkovri la tutan 24-hektaran parkon. La tuttaga ekskurso gvidis nin al la Ŝtona arbaro. Ĝi situas 85 km-ojn for de la urbo Kunming. Survojaj laboroj malrapidigis nian busvojaĝon. Dume ni povis admiri variajn pejzaĝojn, malgrandajn vilaĝetojn, konstantan domkonstruadon kaj vastajn rizkampojn prilaboratajn de kamparanoj kun tipaj konusaj ĉapeloj.
La Ŝtonarbaro vere impresis. Ni promenis inter rokaroj, ĉirkaŭ lagetoj kaj diversformaj kaj koloraj ŝtonegoj. Laŭ fantazio oni povas en ili imagi diversajn figurojn kaj estaĵojn. Florantaj kampoj, ŝvebantaj papilioj, plurkoloraj arbustoj kaj tropikaj floroj alvokas fortan impreson pri la beleco de tiu paradiza loko.
Interesa estis ankaŭ la loka bazaro, kie oni vendis ion ajn, bezonatan kaj nebezonatan. Allogaj estis tropikaj legomoj kaj fruktoj. Malpli allogis kokin- kaj porkpiedoj, pork-oreloj kaj muzeloj, vivaj bufoj kaj serpentoj atendantaj aĉetontojn por la konsumado. Ne mankis ŝamanaj medicinaĵoj.

La lasta vespermanĝo estis pli festa kaj la adiaŭa programo okazis denove en la halo de la Profesia Artkolegio kun bunta programo. Kelkaj elstaraj personoj ĉiam post la prezentitaj spektakloj persone dankis kaj manpremis kun la aktoroj.
Dum la tuta semajno ni ĝuegis riĉan kulturan programon kaj ĉinan afablecon. Koran dankon al la organizantoj pro la etosoplena kongreso!

Liba Gabalda

UK en Lillo

La lastaj informoj antaŭ la forveturo per la buso de AEH al la UK en Lillo estas almetitaj al tiu ĉi Informilo por partoprenontoj. Estas tie detaloj pri tranoktado, ekskursoj kaj pri ĉio, kion ili ne forgesu kunpreni.
Mi memorigas aparte:
Post la reveno el Francio certe Vi havos multajn travivaĵojn. Se Vi tie travivos ian interesan epizodon, skribu ĝin al nia redakcio, por ke ankaŭ aliaj legantoj, kiuj ne havis eblon partopreni, povu iom ĝui.
Ankaŭ mi esperas, ke iu sendos al ni la tutan raportaĵon.
Antaŭdankas via redaktorino Jarmila Rýznarová

Kristaloj en artikoj

La artiko ŝvelas, ĝi ruĝiĝas, varmegiĝas kaj doloras. Tiuj estas simptonoj de artrito. Kontraŭ la malsano disponeblas ne nur medikamentoj – per taŭga sinnutrado eblas efike kontraŭagi.
Se la artikoj subite ekdoloras, tiam artrito povas esti la kaŭzo. Kiu ne submetiĝas al kuracado, tiu riskas ankoraŭ pli fortajn dolorojn kaj en ekstrema kazo malfunkcion de la renoj.
Ĉe artrito la metabolo de purino misfunkcias. Purinoj estas bezonataj por la formado de novaj ĉeloj. Ili estas en ĉiuj korpaj ĉeloj kaj en nutraĵoj. Nebezonatajn purinojn la korpo malkonstruas, el tio ekestas urinacido. Normalkaze ĝi estas komplete eligata. Tamen ĉe kelkaj homoj tio ne funkcias. La koncernaj homoj havas pli altan nivelon da urinacido. Pro tio enmetiĝas urinacidaj kristaloj en la histo kaj precipe la artikoj dum atakoj forte doloras. Sen la kuracado minacas malfunkcio de la renoj.

La malsano laŭ ĝisnunaj spertoj trafas pli ofte virojn ol virinojn. Kaj temas ĉefe pri homoj inter 40 kaj 60 jaroj. Artrito en riĉaj landoj estas pli disvastiĝinta ol en pli malriĉaj landoj. La kaŭzo estas precipe malsamaj manĝokutimoj. La koncernaj homoj ofte paralele suferas pro tropezo, diabeto, alta nivelo de sangograso kaj alta sangopremo.

Artrito 99-procente estas hereda malsano. Sed artrito povas esti ankaŭ rezulto de gravaj malsanoj, ekzemple ĉe tumoroj aŭ leŭkemio, kie amase pereas ĉeloj de la propra korpo kaj disŝutiĝas grandaj kvantoj da purino.

Riskofaktoroj estas precipe abundaj manĝoj kun nutraĵoj, kiuj enhavas multe da purino kaj abunda konsumo de alkoholo, precipe de biero. Nutraĵoj kun multe da purino estas viando, kolbaso kaj internaj organoj kiel renoj kaj hepato. Relative multajn purinojn enhavas ankaŭ kelkaj specoj de fiŝo kiel salmo kaj haringo kaj aliaj marbestoj. Ankaŭ en limonadoj kaj sukoj troviĝas multe da purinoj. Apud malsana sinnutrado ankaŭ tropezo kaj manko de sinmovo povas konduki al artrito.

La kuracado celas redukti la nivelon de urinacido. Ju pli frue oni komencas

la terapion, des pli bone estas. Krome helpas la ŝanĝo de manĝo- kaj vivokutimoj kontraŭ atakoj de artrito. Kiu estas tro peza kaj reduktas sian pezon, tiu povas eviti la dolorigajn atakojn. Kaj estas pli bone rezigni pri alkoholo kaj pri nutraĵoj, kiuj enhavas multe da graso kaj da purino. Precipe gravas trinki ĉiutage almenaŭ du litrojn - ekzemple akvon aŭ teon.

El interret-retradio

El fervoja mondo 6 artikoloj de J. Tomíšek:

Japanio: **Ĉu la fama trajno Orient Express revenos?**

Japanoj triumfas pri legendo

En la mondo ekzistas malmultaj landoj, kie fervojo estas tiom populara kiel en Japanio. Por fervojminiaturoj aŭ por luksaj vojaĝoj per fervojo homoj elspezas multan monon. Tio inspiras trafikistojn por pripensi novajn aktivaĵojn.

Nuntempe ekzemple trafikas sur la insulo Kyüshü cele spekti turismajn allogaĵojn en ĉirkaŭaĵo de la trajnoj Nanatsuboshi. Tiuj ĉi trajnoj de la kompanio JR Kyüshü konsistas el sep pasaĝervagonoj, el tiuj kvin estas litvagonoj, unu estas restoracia kaj unu distradvagono, en kiu troviĝas ankaŭ drinkejo kaj fortepiano.

La trajnkompleto (kun lokomotivo) kostis preskaŭ same kiel grandrapida vagonkombinaĵo Shinkansen, kiu tamen estas pli longa. La ruĝkolora lokomotivo estas duenergia (elektra kaj dizela trakcioj).
Post luksa hotelvagonaro por Kyüshü nun kun simila trajnkompleto venas al tiu ĉi merkato la trafikisto JR East. Temas pri fervoja kompanio, funkcianta en orienta Japanio.

Nova vagonaro superas per siaj aspekto kaj komforto siajn antaŭulojn

JR East jam nun allogas pasaĝerojn al konataj noktaj trajnoj Kassiopeia kaj Hokutosei, konsistantaj el litaj kaj restoraciaj vagonoj. Por japanaj fervojaj favoruloj estas agodevo en tiu ĉi trajno veturi. La nova kvinstela vagonaro superas ne nur per sia aspekto, sed ankaŭ per sia komforto kaj kompreneble ankaŭ per sia kosto iamajn luksajn trajnojn, senescepte de la legenda Orient Express. La projekton preparis la aŭtomobila projektisto Ken Okuyama, kiu laboris ankaŭ por la firmaoj Porsche kaj Ferrari. Ĝia konstruproponо post finpreparo enhavas unuetaĝajn apartamentojn kaj grandampleksajn amuzospacojn, kiuj memorigas pri la internaĵoj de luksaj ŝipoj por rondvojaĝoj „Cruise Ships“.

Panoramaj travideblaj muroj etendiĝas ĝis la tegmento.

Inter la dek preparataj luksaj pasaĝervagonoj troviĝas ankaŭ du panoramvagonoj kun travideblaj muroj ĝis la tegmento. La pasaĝeroj krome havas je dispono po unu restoracian kaj por-amuzan kupeojn inkluzive kvin vastaspecajn pasaĝervagonojn kun dek sep grandaj apartamentoj, en kiuj ne mankas banejoj kaj litkupeoj. Ĉiu pasaĝervagono estas destinita por 34 pasaĝeroj, kvankam ĉi tie eblas pli konvena termino „gastoj“.

La trajnoj en estonto trafikos al belaj naturlokoj en la ĉirkaŭaĵo de la japana metropolo Tokio. La veturbiletoj kompreneble ne estas malmultekostaj. Ekzemple dutaga veturado en luksa trajno de la kompanio Kyüshü Nanatsuboshi (7 steloj), kiun oni lastatempe envicigis en trafikon, kostas de 180 milojn ĝis 525 milojn da enoj, do ĉirkaŭ 1300 ĝis 3800 eŭrojn.

La trajno komencis trafiki en oktobro 2014

La oficiala enkonduko de la kvinstelaj trajnoj okazis la 15-an de oktobro 2014. La muroj kaj plankoj de la pasaĝer-vagonoj estas garnitaj per speciala, bonodora lignaĵo, hinoki. La lavujoj estas permane produktitaj, simile kiel la meblaro devenanta el la regiono Fukuoka.
La hejmstacio de la vagonaro estas en la urbo Hakata, el kiu la trajnoj ekveturas al la lokoj Jufuin, Aso, Nagasaki kaj aliaj. La pasaĝero povas elekti inter unu ĝis tri tranoktoj. La veturbiletoj kostas ĝis 550 milojn da enoj (ĉirkaŭ 4200 eŭrojn) por persono en dulita ĉambreca kupeo. Malgraŭ tiu ĉi alta kosto al JR Kyüshü jam en la komenco de la ekspluatado venis mendoj dekoble pli multaj, ol estas trajnkapacito, kaj pro tio ĉiu trajno jam en la komenco de sia ekspluatado fariĝis por kelkaj monatoj senespere antaŭaĉetita. (laŭ japanmark.de)

Germanio:

La trafik-kompanio DB investos miliardojn en tunelojn

Plej malfrue ĝis la jaro 2019 Germanaj Fervojoj (*DB*) intencas renovigi 18 tunelojn, kaj ĝis la jaro 2024 renovigi pliajn 36. Multaj el tiuj ĉi tuneloj estas historie valoraj kaj signifaj. Al la plej multekostaj projektoj, nuntempe realigataj, apartenas renovigo de la 135-jara tunelo „*Kaiser-Wilhelm*“ apud *Cochem* ĉe Mozelo (Rejnlando-Palatinato). Por tiu ĉi konstruaĵo ĝis 2016 oni investos 200 milionojn da eŭroj. En pluaj kvin jaroj oni investos por renovigo ĉirkaŭ unu miliardon da eŭroj, kio laŭ la nuntempa investa programo de la Akcia Kompanio *DB Netzt* estos duoblo. La financaj rimedoj venos plejparte el ŝtataj fondusoj por modernigo.

Hispanio:

Firmao *CAF* liveros veturilkombinaĵojn por Nederlando

En konkursa pritrakto por Nederlandaj Fervojoj (*NS*) por 120 unuetaĝaj elektraj vagonkombinaĵoj por regiona pasaĝertrafiko venkis la hispana produktisto *CAF* kun sia koncepto „*Civity*“. La kombinaĵoj estos du- aŭ

trivagonaj de la tipo *SGMm* (serioj 2100 kaj 2900). La kontrakton reprezentantoj de la firmao subskribis fine de 2014. Liverado de la unuaj veturilkombinaĵoj estas atendata por la jaro 2018. La mendo valoras 510 milionojn da eŭroj, kaj enhavas ankaŭ kelkajn antaŭaĉetajn rajtojn.

Preparis Jindřich Tomíšek, reviziis Heinz Hoffmann

Kalendaro de Polaj E-eventoj – 2015

21 - 23. 08. 2015	10-a - Esperantista Kajakado laŭ la rivero Drwęca.	
9-12.07. 2015	Kurso de Esperanto kaj Esperanta stando dum SLOT Art Festival en Lubiaz	Pola Esperanto-Junularo kaj Silezia Esperanto-Asocio
23.07. - 4.08. 2015	Komuna ekskurso al UK Lille kaj Parizo	Centro de Interkultura Edukado CEM en Nowy Sącz
10-13.09. 2015.	La 3-a „Esperanto sur la strando“ en SOPOT	Triurba Esperantista Asocio “TORENTO” torentoso-pot@wp.pl
2-9. 09.2015	48 Internacia Esperanta Feriado en Duszniki Zdrój	Silezia Esperanto Asocio, ul. Kościuszki 35 A, 50-011 Wrocław http://eo.wroclaw.pl/sea/duszniki/
8-10. 9.2015	Jubileo de la 10-a ĉeesto de Esperanto dum Ekonomia Forumo en Krynica	H. Komar kaj Parlamenta Grupo Subtenanta Esperanton
25-27.09. 2015	31-a Artaj konfrontoj en Esperanto en Poznań	www.arkones.org tobiasz@esenco.org

Vizito de Ĉeĥio

En la tagoj 10. – 18. 9. 2015 alflugos grupo de 15 francaj esperantistoj, al kiuj helpos s-ano Pavel Polnický. Ili volus viziti 7 urbojn, ili vojaĝos per malgranda buso kaj ĉie ili volus paroli kun esperantistoj kaj vidi niajn vidindaĵojn. Ili ne bezonas komforton, nur petas mendi tranokton kaj tagmanĝon en la sekvontaj urboj:

10. 9. PRAHA alflugo 18.00 tranokto
11. 9. Praha – trarigardo de la urbo helpe de P. Chrdle tranokto
12. 9. PÍSEK – trarigardo de urbo kaj renkonto kun lokaj esperantistoj
12. 9. vespere ČESKÉ BUDĚJOVICE
geedzoj Tomeček - vespera urbo + klubo tranokto
13.9. ČESKÝ KRUMLOV trarigardo de la urbo kaj kastelo
trarigardo de la urbo kaj instruado en studenta hejmo tranokto
14. 9. SVITAVY E-muzeo + urbo
kaj esp. klubo + E. instruado, Libuše Dvořáková tranokto
15. 9. LITOMYŠL kastelo+urbo
16. 9. BRNO urbo + kluba vespero Marek Blahuš, M. Malovec
Svitavy tranokto
17. 9. PRAHA - trarigardo de la urbo
instruado en studenta hejmo, Marie Drašnarová tranokto
18. 9. Praha – urbo-rigardado, instruado kaj flugo hejmen

Kiu volos helpi, ankaŭ akiri geamikojn el Francio, telefonu al s-ano Pavel Polnický 723 672 335, mail: polnickypavel@seznam.cz,

Al memoruloj de Lančov

La renkontiĝo de partoprenantoj de la estintaj Someraj Esperanto-tendaroj en Lančov realiĝos en la tagoj de la 14-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2015.
Kontakto:let.lancov@seznam.cz, olgalacinova@seznam.cz,
poŝtelefono: +420 737 348 878 red.

Kaj nun – por bona humoro :

Tio ne estas mia problemo

En iu bieno loĝis mastro kaj mastrino. La mastro aĉetis muskaptilon. Nur unu muso vivis en ilia domo. La muso kuris al kokino kaj diris: „Kara ko-

kino, la mastro aĉetis muskaptilon kaj tio estas por mi granda danĝero. Bonvolu likvidi ĝin.“
Sed la kokino respondis: "Tio ne estas mia problemo. En la kaptilo estas malgranda peco da viando aŭ fromaĝo, sed mi manĝas grenon. Tio ne estas mia problemo.“
La muso kuris al porko kaj diris: „Kara porko, la mastro metis muskaptilon kaj ĝi estas por mi danĝera.
Kaj la porko respondis: "Kara muso, en la kaptilo estas nur malgranda peco da viando, sed mi bezonas grandan pecon. Tio ne estas mia problemo.“
La muso kuris al bovino kaj petis: „Kara bovino, la mastro aĉetis muskaptilon kaj tio estas por mi danĝera objekto. Likvidu ĝin."
„Kara muso," respondis la bovino, „tio estas via problemo, mi manĝas nur herbon.“
La mastrino aŭdis nokte el la koridoro, kie staris la muskaptilo "Cvak...". Ŝi ellitiĝis kaj iris en la koridoron. En la kaptilo estis granda serpento, kaptita ĉe la vosto. Kaj la serpento mordis la mastrinon.
Ŝi malsaniĝis, ŝia febro forte altiĝis. La mastro diris al si: Mian edzinon sanigos forta kokina supo kaj mortigis la kokinon.
Sed la sanstato de la mastrino malboniĝis pli kaj pli kaj en la domon venadis parencoj por viziti la mastrinon.
Por ke la mastro povu gastigi ĉiujn parencojn, li mortigis ankaŭ la porkon.
Post kelkaj tagoj la mastrino mortis.
Por ke la mastro povu gastigi ĉiujn funebrajn gastojn, li mortigis ankaŭ la bovinon.
Kaj kiu estas la konkludo de la rakonto? Problemoj de niaj proksimuloj estas ankaŭ niaj.

D-ro Jaroslav Max Kašparů, PhDr., diakono kaj forenza psiĥiatro

La avinoj estas saĝaj

Kun mia nepo mi promenis en parko. Li ion levis de la tero kaj volis ĝin meti en sian buŝon. Mi tion rapide deprenis kaj diris, ke li tion jam neniam faru. "Kial"? li demandis "Ĉar ĝi estis sur la tero, vi ne scias, kie ĝi estis, ĝi estas malpura kaj verŝajne plena de baciloj. La baciloj ofte kaŭzas, ke malgrandaj knaboj malsaniĝas kaj ne sentas sin bone" – mi diris.

Mia eta nepo en tiu momento rigardis min kaj kun admiro deklaris: "Avinjo, kiel Vi ĉion scias? Vi estas tiom saĝa!" Rapide mi cerbumis kaj respondis: "Ĉiuj avinoj konas tiajn aferojn. Ili estas en avinaj taskoj. Tion ili devas scii, alie ili ne povas estiĝi avino".

Ni iris kelkajn minutojn kune silente. La nepo certe cerbumis pri la nova informo, kiun li ricevis de mi.
"Aha... mi jam komprenas tion. Do, se vi tiun taskon ne scipovus fari, estos vi avo".
"Vi pravas, precize tiel", mi respondis kun vasta rideto sur la vangoj.
(*Karaj avinoj, kiam Vi ĉesos ridi, diru tion al iu konata avo*).

tradukis Jarmila Rýznarová

Ĉu nova malsano?

Antaŭ nelonge mi ricevis novan diagnozon. Ĝi prezentas sin ekzemple tiel: Mi decidas akvumi la ĝardenon. Kiam mi venas al la muro de la garaĝo por la kaŭĉuka hoso, mi vidas, ke ankaŭ la aŭtomobilo bezonas iomete laviĝi. Mi iras por la ŝlosiloj de la aŭto, ke mi povu ĝin eltiri antaŭ la garaĝon. Samtempe mi vidas sur la tableto en la antaŭĉambro ĝis nun nemalfermitajn leterojn. Mi metas la ŝlosilojn de la aŭto sur la tableton kaj mi volas ekmalfermi la poŝtaĵon.

Tiam mi ekvidas vicon de reklam-flugfolioj kaj mi iras forĵeti ilin en la konteneron sur la strato. Ĉe tio mi rimarkas, ke apud la kontenero estas leterujo, do estus bone tien meti ankaŭ la leteron, kiun mi vespere skribis. Do mi iras por ĝi en la ĉambron.

Sur la tablo ĉe la letero staras taso da kafo, kiun antaŭ momento mi ektrinkis. Mi prenis la tason kun la resto de la kafo kaj iris en la kuirejon. Tie mi ekvidis miajn okulvitrojn, kiujn mi matene serĉis. Survoje mi ekvidas, ke la floroj en la vazo jam ekvelkas. Mi elmetis la florojn kaj cerbumas, kion mi volis fari. Mi cerbumas ĝis vespero:

La ĝardeno ne estas akvumita, la aŭtomobilo ne estas lavita kaj mi ne povas trovi ŝlosilojn de ĝi. La letero ne estas en la leterujo kaj mi ne scias, kie ĝi estas. Ĉe la fenestro estas taso kun malvarma kafo. Mi bedaŭras, ke la floroj tute velkis kaj mi ne povas trovi la vazon.
Mi miras, ke nenio estas preta, kvankam mi la tutan tagon ion faris kaj mi estas tre laca.
Ĉu fakte pro tiu nova malsano? Ne ridu, se vi similajn statojn ankoraŭ ne konas. Via tago proksimiĝas! ...

El interreto tradukis Jarmila Rýznarová

Denove tristaj anoncoj

La 6-an de junio 2015 forpasis post grava malsano Jiří Patera, la estinta prezidanto de la praga E-klubo. Vicon da jaroj li ankaŭ redaktis la pragan Bultenon, en kiun li tradukadis plimulton de la artikoloj.
Li naskiĝis 18. 8. 1935.

La 15-an de junio 2015 en la aĝo de 90 jaroj forpasis nia kara amikino el la E-klubo Pardubice Věra Froňková (* 6. 10. 1924)

Honoron al ilia memoro.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Kosnar, J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.